" Jes, mi povas konsenti al tio " diris Alicio.

" Nu do " la Kato daŭrigis " la hundoj graŭlas kiam ili estas kolerigitaj, kaj svingas la voston, kiam ĝojigitaj. Mi, kontraste, graŭlas ĝojigite kaj kolerante svingas la voston. Ĉu do mi ne estas freneza ? "

" Al tio mi ne konsentas " Alicio tuj respondis " ĉar ne per graŭlo la katoj esprimas plezuron; laŭ mi, ilia maniero esprimi plezuron estas tre dolĉa *murmuro*."

" Vi ĝin nomu laŭ via prefero " diris la Kato. " Ĉu hodiaŭ vi kroketludos ĉe la Damo ? "

" Tion mi tre ŝatus " Alicio respondis avide " sed ĝis nun mi ne ricevis inviton."

" Vi tie vidos min " diris la Kato kaj—malaperis !

Tio ne multe surprizis Alicion ; ŝi ja jam alkutimiĝis al strangaj okazoj. Dum ŝi rigardas la lokon, kie antaŭe sidis la Kato, ĝi subite reaperis. " Pardonu " ĝi diris " kio okazis je la bebo ? Preskaŭ mi forgesis demandi ! "

" Fariĝis porketo " Alicio respondis tre trankvile, kvazaŭ la Kato revenis laŭ la ordinara venmaniero.

" Mi kredis ke tio okazos " diris la Kato kaj denove malaperis.

Iom da tempo Alicio staris atende, kredante ke ŝi eble revidos ĝin. Poste ŝi komencis iri



en la direkto de la loko kie, laŭ
la Martleporo. " Ĉapelistojn "
" mi jam konas ; do la Martlepo
multe pli interesa : kaj ĉar ni ja
ĝi eble ne estos furioza ; aŭ a
furioza ol en Marto."

Dirante tion, ŝi suprenrigardi
la Kato sidis sur arbo-branĉo.

" Ĉu vi diris porkon, aŭ for
Kato.

" Porkon " respondis Alicio
preferus, se ĉe sekvantaj alven
aperi kaj malaperi malpli subi
via estas por mi vere kapturniga

" Laŭ via plaĉo " diris la
ekmalaperis tutmalrapide, kom
vostpinto kaj finante per la gri
kelkajn momentojn post kiam
malaperis.

" Nu " pensis Alicio " tre ofte
sen grimaco ; sed *grimaco se*
plej kurioza objekto kiun mi
tuta vivo."

Irinte antaŭen kelkajn paŝoj
la domon de la Martleporo. Ŝ
ĉi certe estas *lia* domo, ĉar la
havis la suprojn en formo de lo
la tegmento estis kovrita per
estis multe pli granda ol la d

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTE